

# BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO,

*Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista*

redaktata de Léon Champy, Fr. Schoofs, Van der Biest-Andelhof,  
Jer. Van Laere kaj Oscar Van Schoor.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)  
Eksterlando . . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)  
Unu numero . . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,  
(rue de la Petite Oursè), Antwerpe 1  
Anvers.

Abonoj kaj Mensejoj : 20, Vondel-  
straat (rue Vondel), id.

Ĵurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Averd-  
straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por  
si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

## Al nia legantaro

La nuna numero estas la lasta el nia unua jarkolekto.

Ni esperas ke niaj gelegantoj ŝatis kaj aprobis nian modestan laboron, kaj ke ili restos fidelaj al ni.

Ni daŭrigos interesi ilin per la bona elekto de la enhavo de la ĵurnalo : artikoloj pri nia kara lingvo, en- kaj eksterlanda kroniko, ĉiuspecaj sciindaj informoj, humor-ajoj kaj spiritaloj, literatura fako, komunikajoj de la Belga Ligo Esperantista kies organo oficiala ĝi estas, ke.

Nia programo, nia konduklinio, restas senŝanĝa. Ni daŭrigos propagandi la Zamenhofan lingvon, ne atentante al tiuj, kiuj, pretekstante ĝin plibonigi, nur celas ĝin detrui.

La solvo de la problemo de la internacia lingvo nur estas trovebla sur tiu vojo. Esperanto ekzistas, Esperanto vivas, Esperanto ĉiutage kaj ĉiuloke fakte provas sian vivforton, sian taŭgecon. Allaj provoj de lingvo internacia restis kaj restos nur projektoj ; Esperanto, kaj nur Esperanto, eniris la realecon.

Al ĝi ni volas dediĉi nian senlakan fervoron, nian tutan sindonon, nian tempon kaj niajn plej bonajn fortojn.

Dankante niajn estimatajn gelegantojn pro la konfido, per kiu ili bonvolis nin honori, ni faras novan varman alvokon al ili por ke ili daŭrige apogu nin kaj ne forlasu nin en la batalado.

Ili ne nur renovigu sian abonon, sed varbu novajn abon-

antojn. Speciale ni kalkulas sur la grupoj, plenfide esperante ke iliaj membroj, are, abonu nian ĵurnalon. La *Antverpena Grupo Esperantista*, *La Verda Stelo*, *la Suda Lumo*, *Suno* (hebrea grupo esperantista) el Antverpeno, — *La Berchema Grupo*, *la Verda Lumo* (Berchem), — *Laboro* (Borgerhout), — *Esperantista Grupo de Huy*, — *la Verda Flago* (Mariaburg) kaj *La Planta Grupo* (La Plante, Namur) estas fiksintaj sian kotizajon tiamaniere, ke ĝi enhavas samtempe la abonkoston por *Belga Esperantisto*.

Kial ĉiuj esperantistaj grupoj belgaj ne sekvas tiun ekzemplon? Ĉu tio, kion faris la diritaj societoj ne estus ebla ĉe la aliaj? Ĉiu, kiu fariĝas Esperantisto, devas per la fakto mem, partopreni en la esperantista movado, sin interesi pri la propagando, kaj ĝin materie subteni.

Nu, nenia apogo estas pli necesa, pli efika ol tiu, farata al la nacia organo.

B. E.

## Belga Ligo Esperantista

La proksima komitato kunveno okazos je *Dimanĉo, la 21a de Novembro*, en speciala salono de la « Café des trois Suisses », 10, rue des Princes et 21, Rue Fossé-aux-Loups, apud la Reĝa Teatro kaj la Centra Poŝtoŝicejo.

La komitatanoj kiuj deziras diskutigi temojn aŭ fari proponojn bonvolu konigi ilin al la subskribinto; la tagordo estos definitive fiksata plej laste la 8an de Novembro.

— La delegitoj de la grupoj estas petataj konigi dum la kunveno la nombron de la anoj de sia societo, por ke oni povu defini ĝian kotizajon por la jaro 1909-1910, laŭ Art. 6 de la regularo.

La Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista,  
VAN DER BIEST-ANDELHOF.

## La 5a Esperantista Kongreso

(Barcelono, 5-11 de Septembro 1909)

La 5a esperantista kongreso anonciĝis tre brile. Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIIIa bonvolis akcepti la honoran prezidantecon de ĝi, kaj la organizintoj sukcesis varbi kiel altajn protektantojn Lian Princan Moŝton Karolo de Borbono, la Prezidanton de la Ministraro, ĉiujn ministrojn, plie kiel honorajn membrojn la Prezidanton de la provinca deputataro de Barcelono, la Ĝeneralestron de Katalunujo, la Provincestron, la Urbestron, la Rektoron de la Universitato, kune kun la

tuta eminentularo de la Urbo kaj la redaktararo de la ĉefaj Barcelonaj ĵurnaloj.

Aliflanke diversaj cirkonstancoj malfavore influis sur ĝin; la sidejo de la kongreso estis tro ekstercentra; la dato estis iom malbone elektita ĉar por diversaj samideanoj la libertempaj tagoj jam estis pasintaj, kaj ĉefe la okazintaĵoj de la monato Julio timigis multajn.

Spite tiuj malhelpaĵoj, la kongreso atingis tre honoran sukceson kaj kunigis pli ol 1300 aliĝojn. Ĝin ĉeestis 14 Belgoj: S-roj Van der Biest Andelhof, Van Schoor, Cuvelier, De Keukelaere (Antverpeno); — S-ro Abato Richardson, F-ino Moreau kaj S-ro Blanjean (Bruselo); — F-ino Marie Posenaeer, S-ro Roe (Borgerhout); — F-ino Marie De Wolf, S-ro Karel de Wolf (Brugo); — S-ro Abato De Wolf (Ostendo); — S-ino Brutsaert (Watou) kaj S-ro Blaise (Lovenjo).

Mi estis en Barcelono de Vendredo vespere le 3a. Multaj kongresanoj jam estis alvenintaj, sed la granda afliuo okazis la morgaŭan tagon. Kun ĝojo mi renkontis multe da malnovaj konatuloj, kaj plezure mi konatigis kun novaj amikoj.

La hotelo « Gran Hotel de Paris », proksime de la « Rambla de los Floros », gastigis dudekon da diverslandaj esperantistoj. Mi ĉiam agrable remomoros pri la agrabla semajno kiun en ilia aminda societo mi travivis.

\* \* \*

Jam *Sabaton, la 4an de Septembro*, D-ro Zamenhof estis oficiale akceptita en la Barcelona urbhotelo, kune kun la komitato de la kongreso, la konstanta komitato kaj la akademi-anoj. La sekvantaro okupis kvar veturilojn, antaŭeniritajn de rajdantaj urbaj gardoj. Lia Urbestra Moŝto bonvene salutis nian karan Majstron, kiu afable respondis, dankante pro la bona akcepto.

Simile ovi vizitis la Ĝeneralestron de Katalunujo kaj la Provincestron.

Laŭ la « provizora » programo (definitivan mi ne vidis) la solena akcepto de D-ro Zamenhof estis anoncita kiel okazonta en la Stacidomo, *Dimanĉo*, je la 10a matene. Tiun punkton de la « provizora » programo la Komitato forstrekis, sed ĝi invitis la kongresanojn aliri la Palacon de Belartoj, kie oni akceptus nian karan Majstron. La esperantistoj amase plenigis la grandan, belege ornamitan halon, kaj trovis tie geknabojn, revenintajn de la lernejoj kolonioj, kun iliaj gepatroj kaj parencoj. Fine, D-ro Zamenhof alvenis kvazaŭ ne ekvidita en salono de la unua etaĝo, kie li estis salutata de S-ro Pujula. Akcepto tre, tre simpla. Poste la Majstro kaj la esperantista stabo eniris la halon, kie oni interŝanĝis kelkajn pliajn salutojn.

Verdire, oni atendis akcepton pli indan, pli solenan, ol tiu ĉi; ĝi estis deziluziigo por la tuta ĉeestantaro.

Sed ĉies bona humoro tuj revenis, ekvidante la festan aspekton de la bela urbo, kie ĉe la gazetvendejoj kaj multaj hoteloj agitiĝis la esperantista flago, preminte la manon de multaj amikoj kaj ĝuante la ravan ĉarmon de la belega urbo Barcelono, la ĝojan movadon sur la rambloj kaj la bu'ardoj.

Mi ne preterlasu citi, ke dum la mateno okazis diservo por la Katolikoj en la preĝejo de la Bonfaranta Domo, kie predikis mia amiko Abato Richardson kaj benis la ĉeestantaron je la nomo de Lia Papa Moŝto — kaj evangelia diservo kun prediko de Pastro Rust.

Posttagmeze la esperantistoj estis invitataj por ĉeesti la piedpilkan ludon, preziditan de D-ro Zamenhof. Vespere ili kunvenis en la Teatro Romea. Tie okazis tre bela koncerto, ĉeestita de brila, multnombra publiko. D-ro Zamenhof kaj lia inda edzino, kiu sidis en antaŭsceneja loĝio, estis entuziaste ovaciitaj.

\* \* \*

Sed la reala kongresa semajno nur komencis *Lundon*, la *6an de Septembro*.

Je la 10a matene okazis en la belege ornamita festhalo de la Palaco de Belartoj la malferma kunsido. Sur la podio paradis la esperantista standardo kun la enbroditaj nomoj de la ĝisnunaj kongresaj urboj: Bulonjo, Genevo, Kembriĝo, Dreseno, Barcelono. En la mezo, la fidele similanta busto de nia kara Majstro.

D-ro Zamenhof okupas la honoran seĝezon. Sur la estrado, ambaŭflanke de li sidas S-ro Layret, urbestro, S-roj Pujula y Vallès, prezidanto de la kongreso; S-ro Boirac, prezidanto de la Akademio, Generalo Sebert, S-roj Karlo Bourlet kaj Mudie, membroj de la konstanta komitato, la vicprezidantoj kongresnaciaj S-roj Sabadell kaj Perigordo (Hispanjo), Prof. Cart (Francujo), R. de Saussure (Svisujo), Wackrill (Anglujo), Kandt (Germanujo), Harris (Usono) kaj Van der Biest-Andelhof (Belgujo), plie la diversnaciaj delegitoj, la oficialaj delegitoj de registraroj kaj tiuj de Valencia, Cartagena, Terrasso, Villa Nueva, San Sebastian kaj Praha.

S-ro Mybs, prezidanto de la Dresena kongreso, malfermas la kunsidon, transdonante la prezidantecon al S-ro Pujula y Vallès.

D-ro Zamenhof, en mallonga parolado, dankas la Reĝon, la Ministraron, la provincaŭ kaj urban Estraron pro la protekto donita al Esperanto.

Post parolado de S-ro Pujula, kiu sciigas ke Barcelono enhavas 3000 esperantistojn, S-ro Layret, urbestro, per kataluna lingvo, esprimas tutkoran bonvenon al la kongresanoj.

S-ro Gabriel Chavet, sekretario, anoncas, ke tri registraroj sendis por ĝin riprezenti delegitajn al la kongreso, nome Belgujo, Norvegujo kaj Usono.

Nia lando delegis S-ojn Van der Biest-Andelhof kaj O. Van Schoor; la unua alparolis la kunvenintaron jene:

Altestimataj Gesinjoroj,

Mi havas la honoron saluti la 5<sup>an</sup> esperantistan kongreson kiel oficiala delegito de Belgujo.

Jen evidenta pruvo ke Esperanto, kiu dum du jaroj trapasis grandan krizon, estas nune en plena vivforto en mia lando.

Ne nur estas konstatinda la agemeco de la belgaj grupoj, kies nombro senĉese pligrandiĝas, la florado de la nacia ligo, la sukceso de la unua belga kongreso kaj la prosperado de la revuo «*Belga Esperantisto*»,

Jen nun la Belga Registaro, kiu montras sian intereson en nia movado, difinante la prezidanton de la Belga Ligo, kiel sian oficialan delegiton ĉe la nuna kongreso.

Lia Barona Moŝto, S-ro Descamps-David, Ministro de Sciencoj kaj Artoj, komisiis min verki detalan raporton pri la Barcelona kongreso. Mi esperas ke tiu kongreso estos grava kaj interesplena, — mi esperas ke ĝiaj agadoj kaj konkludoj favore influos sur la registaron de mia lando kaj igos ĝin protekti, apogi kaj sukcesigi nian karan lingvon.

S-ro Reed parolas kiel oficiala delegito de la Usona Registaro kaj poste sekvas longa aro da salutaj de ligaj delegitoj. S-ro Abato Richardson je l' nomo de la Belga Ligo Esperantista, S-oj Proviček (Bohemujo), Keating (Brazilujo), Mudie (Britujo), Edwards (Gibraltaro), Andrew Nils (Skotujo), Hinriksen (Danujo), Frenkel (Finlando), Abato Parker (Irlando), Decourt (Francujo), Perigordo, de Allende, Braga, Bremon y Masgrau (lingvoj kastiljana, baska, asturia kaj katalana), D-ro Arnhold (Germanujo), Veranaas (Nederlando), Marich (Hongarujo), Tellini (Italujo), Albinana (Argentina Respubliko), Grabowski (Polujo), D-ro Ovstrovski (Rusujo), Ciklari (Georgujo), D-ro Stamatiadis (Insulo Samos), Privat (Svisujo), Carrère (Košinŝinujo), Guéron (Azia Turkujo), Tiller (Svedujo), Fery (Kroatoj landoj), Schwartz (Bosnujo).

Laŭ propono de D-ro Zamenhof oni salutas telegrafe Lian Reĝan Moŝton, Alfonso XIII<sup>a</sup>, la Princon DonKarolo, la Hispanan Ministraron, L. R. M. La Reĝon de Saksujo kaj S-ro Riccardo Codorniu.

La sekretario, S-ro Chavet, legas multajn telegramojn alvenintajn el ĉiuj partoj de l' mondo kaj la kunsido finiĝis post tre impresiga komuniko de D-ro Zamenhof, kiu emociplene, anoncas la bedaŭrindan morton de F-ino Schröder, Dana esperantistino, kiu bedaŭrinde mortis en Svisujo, dum sia vojaĝo al la Barcelona kongreso. La ĉeestantaro, stare, dediĉis simpatian rememoron al Fraŭlino Schröder.

Posttagmeze okazis la dua agada kunsido, kiu ankaŭ kunigis multnombrian ĉeestantaron. Parolis intersekve S-ro Abato Richardson pri propagando, Mann kaj Blaise pri Esperanto en la komercaj rilatoj, S-ro Mudie kaj Cart pri la utileco de la Ĉefeĉaj ŝlosiloj, S-ro Allende pri la propagando en naciaj journaloj.

*La Mardo, 7<sup>a</sup> de Septembro* estis dediĉata al diversaj kunsidoj. Je la 9a kunvenis la Lingva Komitato, kie S-ro Cart legis tre rimarkindan raporton pri la enkonduko de novaj vortradikaj kaj S-ro de Sanssure raportis pri la teknika vortaro.

Je la 10a okazis en la Paraninfo de la Universitato la ĝenerala kunveno de Universala Esperantista Asocio (U.E.A.) dum kiu la vicprezidanto S-ro H. Hodler en Genevo prezentis la jaran raporton. El tiu raporto aperas, ke U. E. A., kiu havas 8 fakojn (Administrado, Financoj, Esperanto-oficejoj, Konsuloj, Turismo, Komercio, Junuloj kaj Aerveturado) estas en plena prospero kaj jam kalkulas 5.000 membrojn. D-ro Zamenhof elokvente gratulis U. E. A. por ĝia sukcesplena laboro.

Tre interesplena estis la solena kunveno de la Internacia Instituto de Esperanto, okazinta en la sama ĉambrego, je la 11 h. 30. S-ro Edmond Privat montris ke Esperanto estas vere vivanta lingvo, posedanta ĉiujn ecojn kiuj faras la vivon de la naciaj idiomoj. Jam pli ol 20 jarojn ĝi kreskas kaj prosperadas, dum la vivo de aliaj projektoj pri internaciaj lingvoj estas nur efemera.

Laŭtaj aklamoj salutis la paroladon de S-ro Privat, kiun siaflanke, D-ro Zamenhof varme gratulis.

Okazis la saman tagon kunvenoj de leĝistoj, kuracistoj kaj farmaciistoj. Al tiu lasta B. E. dediĉas specialan artikolon.

Oni ekskursis al Sitjes, rava urbeto apud la Mezamaro, kaj vespere, je la 9 1/2a, okazis belega koncerto en la Palaco de Belartoj, kie oni aplaudis la famkonatan *Schola Orpheonica*, kiu talentplene kantis horojn kun esperanta kaj kataluna teksto. Solene resonis la himnon l'Espero, ludita de la fama kataluna organisto S-ro Daniel. Granda kaj meritita estis la sukceso de la festo, kiu honoras la lertan kondukanton, Majstron Marcet.

Tre interesplenaj estis la okazintaj de *Merkredo la 8a*.

Sur vasta, kvarangula herbejo de la Parko estis organizataj je la 10 1/2a matene, sub la gvidado de Generalo Priou kaj D-ro Vaucaire, grandaj manovroj de la Ruĝa kruco. La flegistoj kaj portilistoj estis la Barcelonaj ruĝkrucaj, elegante vestitaj per ruĝe kaj blanke striitaj uniformoj, — la vunditaj estis diverslandaj kongresanoj, komprenantaj nek la hispanan, nek la katalunan lingvon. Esperanto estis la sola rimedo por interkomproniĝi. La eksperimento mirige sukcesis kaj montris unufoje plie, kiel Esperanto kaj Ruĝa Kruco estas du nedisigeblaj institucioj.

Oni konas la *Florajn Ludojn*, fonditaj dans la XIVa jarcento kaj kiuj travivis multajn glorajn jarojn en la suda parto de Francujo kaj en Katalunlando, kie ili, ĝisnune, ĉiujare brile estas festataj. Okaze de la kongreso oni havis la feliĉan ideon kunigi la literaturan kongreson organizatan de la « Revuo »

kun la kutimaj, ĉiujaraj Barcelonaj Floraj Ludoj, miksanter tiamaniere la novon kun la malnovo.

La belega festo de la Floraj Ludoj okazis en la imponanta, riĉe ornamita halo de la Borso, honorgardita de kavaliroj kaj soldatoj de la nacia gvardo. Multnombra, elektita, brila estis la ĉeestantaro. Sur la podio prenis lokon nia kara Majstro, la Urbeŝtraro kaj la Provinĉestraro, la Akademianoj kaj la juĝintoj.

Funde de l'estrado estis starigita orita trono, destinita por la Reĝino de la festo kiu, post malfermo de la koverto entenanta la nomon de la kroninto estas konigata: S-ino Marie Hankel, el Dresdeno, kiu verkis la belan poeziaĵon « la Simbolo de l'Amo ».

Tondra aplaudado esplodas kiam S-ino Marie Hankel, solene estis kondukata al la trono.

S-roj Karlo Bourlet kaj Grabowski faris tre elokventajn paroladojn, kaj oni aklamis la legadon de la kronita poeziaĵo de la Reĝino de la festo kaj tiun de S-ro Privat, al kiu oni aljuĝis la duan premion.

Fine siavice la premiitaj konkursintoj venis saluti la Reĝinon kaj ricevi sian premion el ŝiaj manoj.

Ili estis tre multnombraj. La laureato de la konkurso, difinita de nia redakcio (loka regiona legendo) estis S-ino Louis Rigoir, el Marseille. Inter la ceteraj estas ĉefe nominda nia kara amiko kaj kunlaboranto S-ro Oscar Van Schoor, kiu sukcesis trifoje, kaj kiun plej amike kaj entuziasme priestis la esperantistaj gastoj el la Gran Hotel de Paris.

La saman tagon okazis en la Ateneŭ Barcelones la interesplena kunsido de la internacia laboristoj en kiu ĉefe partoprenis preslaboristoj. D-ro Zamenhof prezidis ĝin. Sur la estrado oni rimarkis ankaŭ S-ron Pujula kun multaj eminentuloj, inter ili la direktoroj kaj korespondantaj de dekduo da journaloj. Tre elokvente parolis S-ro Luis Llagostero, S-ro Tabeto, D-ro Zamenhof mem kaj precipe S-ro Luis Carlos, kiu trafe montris la necescon de Esperanto ĉe la profesiaj societoj. Li insistis sur la brilaj rezultatoj jam akiritaj de la *Internacia ligo de la esperantista preslaboristaro*. Post sesmonata funkciado aliĝis al ĝi 385 tipografistoj esperantistaj, 298 presejoj, 17 fandejoj aŭ fabrikantoj de kompostmaŝinoj kun esperantaj matricoj.

Unuvorte, tre sukcesinda kunsido, kiu sendube estos tre fruktedona.

Vesperi okazis en la *Teatro del Bosque* presentado de la Wagner'a Opero *Lohengrin*, ĉeestita de Gesinjoroj Zamenhof. Kelkaj partoj el ĝi estis kantataj en Esperanto.

\* \* \*

*Faŭdon*, je la 9a komenciĝis ĝenerala kunveno de la kongreso en la Paraninfo de la Universitato. S-ro Gabriel Chavet, je l'onomo de la konstanto komitato proponis la starigon de internacia komitato, kies tasko estus, labori kaj agi kune, por prosperigi nian movadon. La anoj de tiu komitato estus elektotaj laŭ fiksota proporcio.

Tiu ĉi riprezentaro ankaŭ siu okupus por garantii la financajn interesojn de la Kongresa komitato kaj la aliaj ekzistantaj esperantistaj organismoj.

Parto de la kunvenantaro sin montris malfavora al la projekto, varme defendita de S-roj Chavet, Boirac, Mybs kaj Sebert. Oni ĉeestis tre rimarkinda, turniro de elokventeco: la kontraŭstarantoj estis S-ro Mann, Bobin, Blaise kaj aliaj.

S-ro Privat proponis ke oni ne voĉdonu pri la plena propono, sed nur pri tiuj punktoj kiujn ĉiuj povus aprobi. Laŭ deziro de S-ro Cart la kongresestraro decidis ke oni disdonos presitan tekston, kiun ĉiuj povus mature pripensi kaj pri kiu oni interkonsentus en posta kunsido.

Posttagmeze novaj ekskursaj. Oni supreniris, ŝnurvoje, la monton Tibidabo kaj oni vizitis la pentrindan vilaĝon Vallvidrero. La komercistoj kunvenis en la Café Continental.

Vespere multe da esperantistoj ĉeestis en la Teatro Romea la prezentadon de *Mistero de Doloro*, dramo de la fama dramaturgo Adriano Gual kaj esperantigita de S-ro Pujula. La sukceso estis grandega.

\* \* \*

Diversaj specialaj kunsidoj okazis je *Vendredo*, la 10a. La plej grava estis la solena kunveno de la Sciencasocio prezidita de Generalo Sebert. S-ro R. de Saussure klarigis la laboron de la Sciencasocio pri la teknika vortaro. Oni elektis novan komitaton konsistantan el S-roj Prof. Hunnington, Generalo Sebert, Prof. Köppen, Prof. Villareal kaj S-ro R. de Saussure.

Posttagmeze mi havis la plezuron ĉeesti intiman feston en la ĝardeno de la Palaco de Belartoj. S-ro Privat rememoris la 20an datrevenon de sia raskiĝo kaj kunigis je tiu okazo sesdek da amikoj. La kunestado estis tre kora. Plej simpatiaj toastoj estis elparolataj de D-ro Zamenhof, Prof. Cart, Baronino de Ménil, Abato Richardson, S-ino Marie Hankel, S-roj Moscheles, Mudie kaj Hodler.

Vespere, je la 10a okazis granda internacia balo en la festhalo de la Palaco de Belartoj, kies aspekto estis mirinde bela. Oni ludis kaj dancis multajn katalunajn dancojn kaj ankaŭ la esperantista «Rondo». Rimarkinda estis la multeco da pentrindaj naciaj kostumoj.

\*

En la ĝenerala kunveno, okazinta je *Sabato* la 11a en la Paraninfo de l'Universitato, S-ro Rektoro Boirac legis la raporton pri la laboroj de la Lingva Komitato en kiu li deklaras ke, unufoje por ĉiam, la Akademio malakceptos ĉiujn projektojn pri reformoj, ne konformaj al la principoj de la Fundamento. Esperanto li diris, estas nun *vivanta* lingvo, kiu devas evoluei malrapide kaj nature, tute simile kiel la naciaj lingvoj. Neniu en la mondo povas ĝin arbitre tuŝi. (*Longa aplaŭdado*). La proponoj pri novaj sufiksoj (— *oz, iz* ke.) estas akceptitaj por la scienca aŭ teknika lingvo, el kiu ili oniŝoviĝos en la komunan se ili estas bezonataj.

S-ro Generalo Sebert anoncas ke la 6a kongreso (1910) okazos en Vaŝington kaj la 7a (1911) en Antverpeno. Pri la unua donas kelkajn klarigojn S-ro Reed, pro la elekto de la lasta dankas S-ro Van der Biest, Prezidanto de la Ligo kaj delegito de la Belga Registaro.

La demando, pri kiu oni ne povis interkonsenti dum la ĵaŭda kunveno, estas feliĉe solvata dum la ferma kunsido. Unuvoĉe oni akceptas la proponon de S-ro Privat, redaktitan jene:

La 5a kongreso de Esperanto esprimas la deziron ke la naciaj societoj por la propagando de Esperanto kreu per proporcia balotado internacian konsilantaron, kiu zorgos pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj (lingva komitato kaj konstanta komitato de l'kongresoj). Oni elektos la konsilantojn po unu por mil anoj de propagandaj societoj.

S-ro Bourlet, en brila improvizio, konstatas la gravajn rezultatojn de la 5a kongreso kies ĉefa karaktero estis la unanimeco, la paca diskutado kaj plena interkonsento.

D-ro Zamenhof fermas la kunsidon per elokventa parolado al la Urbestro, la Organiza Komitato kaj ĉiuj kiuj favoris la kongreson. La ĉeestantaro entuziasme ekkantas la himnon esperantistan kaj disiĝas ekkriante: Vivu Esperanto! Vivu Zamenhof!

Je la 10a vespera oni kunvenis lastfoje en la Palaco de Belartoj kie la Urbestro prezentis lunĉon al la gekongresanoj. Estis la adiaŭta kunestado. Multaj esperantistoj esprimis al mi sian kontentecon pri la elekto de Antverpeno kiel kongresurbon kaj firme promesis ĝin ĉeesti.

Je mia reveno en la Skeldurbo mi eksciis lu saman kontentecon de mia Antverpenaj amikoj, kiuj promesis fervore kunlabori kaj ageme klopodi por inde sukcesigi la Sepan.

AMATUS. (1)

(1) Malsanetinte dum 2-3 tagoj dum la kongresa semajno miaj notoj ne eviteble estas malkompletaj. Por tamen prezenti kompletan raporton mi permesis al mi kelkajn malgrandajn pruntojn el *Svisa Espero* kaj el *Monde esperantiste*. Mi esperas ke niaj estimindaj kunfratoj ne malfavore akceptos la prenitajn liberecon.

## La Esperantista Farmaciista Kongreseto

La vigla, en Dresdeno starigita, Internacia Esperantista Farmaciista Asocio, okaze de la Va internacia kongreso en Barcelono havis kvar kunvenojn, dum kiuj la ĉeestantaj farmaciistoj, el diversaj mondpartoj kunvenintoj, priparolis kaj interdiskutadis diversajn profesiajn kaj sciencajn temojn.

Jaŭdon la 9<sup>am</sup> de Septembro la farmaciistoj, dank'al la kunlaborado de la Barcelonaj samideanoj D-ro Ramon Bartomeu kaj D-ro José Pons ricevis oficialan tutkoran akcepton en la kunvenejo de la Colegio de Farmaceuticos de Barcelona. Je la 7a vespere la prezidanto de la Colegio, D-ro Puigpiqué, la sekretario S. Vallès y Ribon kaj multaj aliaj Barcelonaj kaj Hispanaj kunfratoj, inter kiuj ni speciale rememoras la nomojn de D-roj Villarroya, Segué, Cardona, Torra, Bartomeu, Pons, Piza k. t. p. atendis la kongresanojn farmaciistajn en la kunvenejo de la Colegio, Calle Guardia, 9.

Trideko da esperantaj farmaciistoj ĉeestis la kunvenon, kiu komencis per la interkonatiĝo de la diversaj ĉeestantoj. Koraj manpremoj kaj afablaj paroloj estis interŝanĝataj de la ĝojplenaj kunfratoj. Vere en tiu momento oni eksentis la internacian fratecon de la kunvenintoj.

La prezidanto cedis la ĉefan lokon al la Sekretario de la Internacia Esperantista Farmaciista Asocio, S-ro Oscar Van Schoor, el Antverpeno, delegito oficiala de la Belga Registaro, kiu per koraj paroloj dankis la Colegio de Farmaceuticos, kaj salutis la esperantistajn kunfratojn. Poste li faris paroladon montrante la utilecon kaj la necescon por farmaciistoj okupi sin pri la internacia helpa lingvo. Je l' nomo de siaj delegantaj societoj parolis poste S-roj Ramon Bartomeu (Barcelona), Agostino Levanzin (Malta), Borson (Chateau Thierry), Rousseau (Paris), Wicart (Roubaix), Heiberg (Kopenhago) k. t. p.

La sekretario de la Colegio, S-ro Vallès y Ribon, salutinte la kongresanojn, faris paroladon en kiu li pritraktis la historion de la Colegio, la plej antikva societo de farmaciistoj de la mondo. Je l' fino de sia parolado, li sciigis ke la Colegio, kiel pruvo de simpatio al la kunfratoj kaj al Esperanto decidis nomi kiel membrojn korespondantojn ĉiujn eksterlandajn farmaciistojn ĉeestantajn la kongreson.

Post la festa kunsido, la Colegio en sia biblioteko prezentis belegan lunĉon al la esperantistoj. La menuo de tiu kora akcepto estas tute inda esti presita en nia raporto :

*Diversaj viandaĵoj, bulkoj.*

*Sinko kaj galateno.*

*Dolĉaĵoj variaj.*

*Vino de Jerez (Sanchez Romate).*

*Ĉampanvino Moët-Chandon.*

*Glaciaĵo kun vanilo.*

*Diversaj enlandaj kukaĵoj.*

*Haban Cigaroj.*

Je la ĉampanvina momento elparolis toastojn en la diversaj lingvoj S-roj Levanzin, Rousseau, Wicart, Heiberg, Pelouille, Bartomeu, Puigpiqué, Villaseca, Van Schoor, k. t. p. Intersekve oni audis toastojn en angla, franca, itala, malta, germana, araba, hispana, kataluna, flandra kaj esperanta lingvo. Fine, resumante la diversajn impresojn, la prezidanto de la kunveno, S-ro Oscar Van Schoor, faris, hispane, la sekvantan toston :

*Queridos Amigos Comprofesores,*

Es para todos nosotros en este momento grande placer ofrecer a nuestros Colegos del más antiguo cuerpo de farmacéuticos de todo el mundo, de cuyo tengo el honor ser coresponsal desde hacia cuatro años, el homenaje de nuestros sentimientos de profunda gratitud y de sincera confraternidad. Viva el Colegio de Farmacéuticos de Barcelona, viva la ciudad de Barcelona, la perla de Cataluña, viva la hermandad de todos los farmacéuticos de la tierra, para el progreso de las ciencias y para el bien y la salud de la humanidad.

La Vendredon matene je la 10a, posttagmeze je la 5a kaj Sabaton matene je la 10a okazis la laboraj kunvenoj, dum kiuj la kongresanoj priparolis la diversajn temojn kaj decidis pri diversaj organizaj punktoj.

Estis elektataj kiel prezidanto de la Internacia Esperantista Farmaciista Asocio S-ro D-ro Agostino Levanzin, farmaciisto kaj advokato en Malta; kaj kiel Sekretario-Kasisto S-ro Oscar Van Schoor, Vondelstrato, 20. Antverpeno (Belgujo).

La diversnaciaj vicprezidantoj kaj komitatanoj, kies nomojn ni ne povas tie ĉi aldoni pro manko da loko estis poste difinataj. Ankaŭ estis decidataj inter aliaj punktoj de la regularo, ke la jara kotizaĵo estos minimume 1 Sm. (2.50 frankoj). La eldonon de faka ĵurnalo « Farmacia Stelo », kies jara abonprezo estos 1 Sm., ankaŭ decidis la ĉeestantaro.

Inter la rimarkindaj sciencaj temoj priparolitaj ni citu : 1<sup>o</sup>) Pri la fama *Fungus Melitensis*, historiaj, botanikaj kaj terapeutikaj rimarkoj, de D-ro Agostino Levanzin ; 2<sup>o</sup>) pri la nova Franca Farmakopeo, de S-ro Borson (el Chateau-Thierry) ; 3<sup>o</sup>) pri ĝenerala reakcio de la saloj halogenitaj de fero kaj 4<sup>o</sup>) pri kelkaj nekunigeblaj medicinaj substancoj, de S-ro Oscar Van Schoor (Belglando). k. t. p.

Inter la profesiaj kaj propagandaj temoj kiujn priparolis kaj interdiskutadis la kongresanoj, estas citindaj : 1<sup>o</sup>) Raporto pri la Farmacia Kunveno en Dresdeno ; 2<sup>o</sup>) pri limiĝo aŭ libera ekzerco de la farmacio (S-ro De Wolf el Bruĝo) ; 3<sup>o</sup>) pri la reorganizacio de la farmaciaj studadoj en Francujo (S-ro Pelville) ; 4<sup>o</sup>) pri la venonta kongreso de farmacio en Bruselo 1910 (S-ro Rousseau) ; 5<sup>o</sup>) pri utileco de naciaj formularoj (S-ro Cuvelier-Antverpeno) ; 6<sup>o</sup>) pri la deklingva Esperanta farmacia

vortareto (S-ro Rousseau) ; 7<sup>o</sup>) Pri farmacio, ĉu scienca, ĉu komerca afero (S-ro Heiberg) ; k. t. p.

Pli ol 40 diverslandaj farmaciistoj ĉeestis la kunvenojn kiuj mirinde sukcesis, kaj ĉiam okazis en la kunveno de la afabla Colegio de Farmacéuticos de Barcelona. Je la fino de la lasta kunveno oni fotografis la ĉeestintajn anojn, kiel memorajo de la bone sukcesinta kongreseto. Krom la eldono de farmacia esperantista ĵurnalo kaj de la deklingva farmacia vortareto, la ĉeestantaro decidis ke estas devo por ĉiuj esperantistaj kunfratoj sendi peton personan al la estraro de la Farmacia Internacia Kongreso de Bruselo (1910) por ke Esperanto estu oficiale akceptata kiel kongresa lingvo, kiel oni same sukcese faris por la Internacia Kuracista Kongreso de Budapesto, 1909. La adreso de la Brusela kongresa sekretariĵo estas 12, rue Malibran, Bruxelles. La formulo por peti estas sekvanta: *Mi, subskribinto, farmaciisto en... intencas partopreni en la kongreso de Farmacio. Mi deziras scii ĉu mi havos rajton fari komunikajon en la lingvo Esperanto.* (Propono Rousseau).

Dank' al la «Colegio de Farmacéuticos de Barcelona» kiu komprenis la gravecon de nia esperanta movado, dank'al niaj Barcelonaj kunfratoj D-roj Ramon Bartomeu, Puigpiqué, J. Pons kaj Vallès y Ribon, - dank'al la ĉeestado de multnombraj fremdlandaj samideanoj kunfratoj kaj al la aliĝo de preskaŭ cent farmaciistoj, nia I. E. F. A. sukcesas kaj progresas. Estas devo por ĉiu samideana kunfrato, komprenanta la altecon de nia celo, la gravecon de nia movado kaj la malfacilecon de niaj klopodoj, apogi nian laboradon, kunhelpi nin kaj fari ĉion eblan por la fina venkado de nia nobla kaj ideala batalado. Aliĝu ĉiuj, aliĝigu ĉiujn, kunlaboru ĉiuj al nia faka revuo kaj post malmulte da tempo ni estos starigintaj potencan kaj influan internacian kunfratan asocion. ĈEESTINTO.

## La skribsistemoj de l'Blindulo

(Daŭrigo)

### Evolucio de l'sistemo braille'a

Dum la okdekjara ekzistado de l'braille sistemo, neniu ŝanĝo okazis en ĝi ; tamen ĝia evolucio estis tre grava kaj ĝis nun daŭradas senhalte.

Mi montris en la Junia numero de tiu ĉi revuo, kaj precipe en artikolo : Esperanto kaj la Blinduloj (Belga Sonorilo de Aprilo 1907<sup>a</sup>) ke la Braille sistemo, malgraŭ ĝia taŭgeco, ne atingas la valoron de la vidulskribado. Jen la ĉefaj malsuperecoj :

1<sup>o</sup> La braille-literoj postulas pli da loko, plifortan, do pli koston paperon ol la ordinaraj literoj ; 2<sup>o</sup> la legado estas iom pli malrapida, kaj precipe la skribado. — El tiuj malsuperecoj devenas nature aliaj : multkosto de la libroj, dikeco kaj malfacila manumado de la volumoj, temperdo, k. t. p.

Sur folio de unu kvadrata decimetro, Braille skribis 8 liniojn de 17 literoj = 136 literojn. En la komenco oni opiniis, ke tia grandeco de la literoj estas necesa por la blinduloj. En la jaro 1854, frato Juliano de la Woluwa Instituto, konstruigis skribtabuleton permesantan skribi sur kvadrata decimetro 13 liniojn de 20 literoj = 260 literojn. La profito estis granda : la volumoj maldikiĝis, la papero, almenaŭ por la presado, povis esti malpli dika, kaj la legado plirapidiĝis ; tiu lasta rezultato ne estis antaŭvidita.

Sed la blinduloj kutimitaj nur pri la grandaj literoj, tre malfacile legis la malgrandajn, kaj ĝis 1889 tiuj lastaj nur estis uzataj en la Woluwa kaj Brusela blindul-kaj blindulinejoj. De tiu tempo oni komencis en multaj lokoj uzi la belgajn tabuletojn kaj ilin imiti ; sed ĝis nun la antaŭjuĝoj kontraŭ la malgranda skribajo daŭradas, kaj eble daŭrados longtempe.

De la komenco, por ŝpari tempon kaj paperon, en ĉiuj institutoj oni mallongigis la vortojn, uzante el la 64 signoj la nealfabetajn, kaj forlasante la literojn ne necesajn por la kompreno de l'vorto. Tio estis malbona kutimo ; ĉar tiu mallongigo estis tute kontraŭortografia kaj malsama, eĉ malsimila de lando al lando, de instituto al instituto, ja de blindulo al blindulo. Estis vera ĥaoso. Feliĉe oni nur uzis tiujn mallongigojn en la skribado, neniam en la presado.

S-ro Maŭrico de la Sizeranne, eminenta Pariza blindulo, ĉirkaŭ la jaro 1885<sup>a</sup>, trovis la rimedon por ĉi signi tiun maltaŭgan situacion. Li verkis sistemon de mallongigo, kiu konservas la ortografion kaj ŝparas 30 po 100 da papero. La ekzemplo estis baldaŭ imitata por la germana lingvo de S-ro Mohr, el Kiel ; por la flandra kaj latina de profesoroj de la Woluwa Instituto, por la angla, la portugala, k. c.

La sistemo konsistas el la uzado de la nealfabetaj signoj, kiuj alprenas la signifon de du aŭ pli da literoj ; el la uzado de unu, du aŭ tri literoj por facilaj mu te uzataj vortoj kaj esprimoj. Oni facile komprenas ke, se la du ĵus diritaj principoj estas ĉie la samaj, la sistemo mem estas malsimila de lingvo al lingvo.

Tamen, ni sukcesis por la flandra, konservi 23 signojn litergrupajn el la 39 de la franca sistemo kaj eĉ pli por la latina.

La profitoj de la mallongiga sistemo estas multspecaj : paperŝparo, pli rapida legado kaj skribado.

Por rapidigi la skribadon, oni ankaŭ konstruis skribmaŝinojn laŭ la principoj de tiuj de la viduloj. La meĥanikisto, kiu faras la skribtabuletojn por nia instituto, estas nun serĉanta tian

maŝinon por la malgrandaj literoj, permesantan skribi nur per unu mano. Por la jam ekzistantaj, kiuj nur produktas la grandajn literojn, oni bezonas la du manojn, kaj tio estas granda malhelpo por la kopiado, la blindulo devante legi per unu mano kaj skribi per la alia.

La skribmaŝinoj, eĉ la plej perfektaj, havas grandegan difekton, la multkostecon, kiu fatale malhelpas ilin fariĝi la skribilo de la ĝeneraleco de l'blinduloj. La plimulto el tiuj ĉi devos sinkontentigi je la skribtabuletoj, kiuj ĉiam pliperfektigas. En alia artikolo mi parolos pri ili kaj ankaŭ pri la presado de libroj.

Ĉar la viduloj ne povas legi la braille-skribon, estis tre utile doni al la blinduloj sistemon por korespondi kun iliaj neblindaj fratoj. Tion oni faris en multaj landoj. En tiu fako la unueco estas ne necesa, eĉ havas ne grandan utilon, kaj oni povas diri, ke preskaŭ ĉiu instituto havas kaj konservas sian propran sistemon. En la Woluwa blindulejo ni havas eĉ du: la nereliefan tifografion kiu donas da belaj gotikaj literoj, kaj la belgan punktskribon kiu donas punktrelije la ordinarajn grandliterojn de la presado.

FRATO IZIDORO,

profesoro ĉe la Reĝa Blindulinstituto de Woluwe-Bruselo.

## VOJAGO PER ESPERANTO

Nia koro tute ne estis trankvila kiam, mia edzino kaj mi, je la kvarono de la sesa, ni haltis en la Londona stacidomo Charing Cross, ĉar ni ne parolas angle kaj ni ne sciis kiamaniere ni atingos nian esperantan hotelon, pensionon O'Connor. Nur du frazoj el la angla lingvo estis konataj de mi: *Please*, kaj *I thank you*. Mi memoris cetere bonan konsilon, kiun mi iam legis en esperanta gvidlibro tra Londono: « en okazo de dubo turnu vin al policano, montru al li sur papero skribitan la lokon kien vi deziras iri, kaj li tre afable penos direkti vin. »

Do, dezirante uzi taksametransveturilon mi alparolis policanon, valorigante duonon da mia scio de la lingvo angla, dirante: « *Please, Sir, taxameter!* » Li fajfis kaj tuj alvenis taksametra droŝko. Mi donis al la afabla viro, kiu en mi vekis konfidon per sia ĝentila servemeco la adreson de la hotelo, li legis ĝin kaj laŭ ŝajnis al mi, demandis la veturigiston ĉu li konas ĝin. Tiu ĉi jesis, ni eniris la aŭtomobilon kaj forveturis.

Ni veturis tiel rapide ke nia spirado haltadis. La brua vivo, la amaso da veturiloj en la ĉefaj Londonaj stratoj nin surprizis, kune kun la nekutima rapideco de la veturigistoj,

pri kiuj ni jam hejme legis « ke la lerteco de la Londonaj veturigistoj estas proverba ».

\* \* \*

Post veturigado daŭrinta pli ol duono da horo, ni estis sur la St Stephens square, kaj ni haltis antaŭ domo, kie ni ekvidis verdan stelon kaj la surskribon *Esperanto house*.

Mi sonorigis. Enirinte la domon mi alparolis serviston esperante, sed li ne ŝajnis kompreni. Dum li pripensis alvenis la dommastro, S-ro O'Connor mem, kiu nin afable salutis dirante: « Estu bonvenintaj! » Li demandis nek kiu ni estas, nek de kie ni venas. Ni estis bonvenintaj, kaj akceptataj kiel samideanoj, kies hejmo estas la tuta mondo, kiel amikoj de amikoj.

Post la kutimaj formalajoj koncerne la restadon en Londono kaj la prezon de la luota ĉambro, ni prizorgis iomete niant ualeton por la vespermanĝo, okazonta je la 7a akurate.

La manĝaĝoj estis tre bongustaj kaj la interparolado dum la manĝado tre agrabla. Plezure ni konstatis la valoron kaj la signifon de nia bela lingvo internacia. Ni jam uzis ĝin diversfoje sukcesplene dum nia vojaĝo, precipe en Antverpeno, kie niaj gesamideanoj, S-ro Van der Biest-Andelhof, S-ro Schoofs kaj Gesinoroj Payot tiel agrabligis nian restadon, ke ni estus maldankemaj, se per nia silento ni preterlasus memorigi ilian afablan akcepton. Ni travivis en la granda belga komerca metropolo, dank' al la nomitaj geamikoj, vere feliĉajn, ne forgesablajn horojn.

Sed... ni revenu en nian Londonan pensionon. La interkompreniĝo kaj la amuzo ĉe tablo kaj post la vespermanĝo nur estis eblaj per Esperanto. S-ro O'Connor kaj lia estimata edzino ne komprenis germane, kaj ni ne povis paroli angle. Sed tio ne malhelpis, ĉar, dank' al Esperanto, ni interparolis kaj interkomprenis perfekte.

Tiam senkonscie sonoris en mia kapo la jena verso el nia bela himno:

« Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj,  
Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Per la sankta amo disbatitaj... »

\* \* \*

La sekvantan matenon nia afabla gastiganto donis al ni ĉiuspecajn informojn kaj konsilojn pri nia restado en Londono, precipe pri nia vojira plano kaj la uzotaj omnibusoj kaj tramvojoj.

Ne estas eble imagi la grandegan amplekson de Londono, kiu kalkulas stratojn po milioj da mejloj; unu el la urbaj komunumoj, ne la plej granda, enhavas 700 mejloj = 1129



kilometroj da stratoj. Por veturi de unu loko al alia ekzistas fervojoj sub kaj super la tero, omnibusoj, aŭtobusoj, tramveturiloj kaj kabrioletoj. Dum la favora sezono multnombraj vaporŝipetoj traveturas la riĉeron.

Ne estas mia intenco priskribi la multnombrajn vidindaĵojn de Londono. Mi nur volas altiri la atenton sur la fakton, kiun ni persone spertis, ke estas tre eble vojaĝi nur uzante la lingvon internacian Esperanton; mi renkontis esperantistojn en ĉiuj urboj kiujn ni travojaĝis: en Germanujo, en Belgujo, en Britujo. Ĉie oni akceptis nin plej afable kaj kompleze.

Esperantistoj el ĉiuj landoj! Klopodu senĉese kaj plej fervore por diskonigi kaj disvastigi nian karan lingvon! Niaj rilatoj kun la fremdaj landoj plifaciliĝos kaj pliagrabiĝos kaj fine

« Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian. »

GUSTAV KRATOCHVIL.  
Praha (Prago).

### La Haga Esperantista Tramveturilo.

Jam de kelkaj jaroj, okaze de la revendato de la reĝino Wilhelmino, je la 31a de Aŭgusto, la tramkonduktoroj kutimas ornami la elektrajn tramojn per flagoj, floroj, fruktoj aŭ doni al ili la aspekton de Ĥina sanktejo, antikva gastejo, lulilo, elefanto k. t. p.

Tiu ĉi originala amuzajo allogas amason da fremduloj al la belega holanda urbo.

Dum la pasinta vintro kelkaj konduktoroj sekvis Esperantajn kursojn kaj tiuj fervoruloj nun havis la laŭdindan ideon ornami sian tramon per esperantaĵoj. Plej bona prapagandilo ja ne povis esti elpensita. Dum la tuta tago esperanta tramo veturis de Hago al Seveningo, fama banejo, kie ĉiu somero kunvenas multaj ekskursantoj. La konduktoroj kiuj deĵoris sur tiu tramo respondis al la petoj de la vojaĝantoj en la internacia helplingvo. Ke la tramo allogis la admirantajn rigardojn de urbanoj kaj eksterlanduloj oni facile komprenos se oni ĝin estus vidinta. La du larĝaj flankoj estis kovritaj per blanka tolo sur kiu estis pentritaj tergloboj, interligitaj per banderolo sur kiu oni skribis: « Internacia helplingvo Esperanto » Malantaŭ la tergloboj oni vidis gigantajn verdajn stelojn. Sub ĉiu fenestro oni legis esperantajn devizojn kaj la flankoj estis borderitaj per altaj stangoj, kiuj portis 60 gajajn esperantajn flagetojn. La superparto estis drapita per multkoloraj internaciaj flagoj. Sur

la antaŭa kaj la malantaŭa plataĵo oni legis en grandaj literoj: « Ĉiam antaŭen » bona devizo por tramo, sendube.

Vespere ne estis necese veturi en profunda mallumo, ĉar la belaj verdaj lumigiloj, formante kune grandan stelon, montris la vojon al ĉiuj. Tute certe estas ke de tiu ĉi dato ne ekzistas Hagano kiu ne gaje ekkriis aŭ mirigite balbutis se nur unu fojon dum sia vivado, la nomon: « Esperanto ».

Oni havis la feliĉan ideon fari fotografajon de la esperante ornamita tramĉaro kaj ĝin eldoni kiel ilustrita poŝtkarto. Jen certe bonega kaj plej efika propagandilo.

La poŝtkartoj estas akireblaj ĉe F-ino N. Boon, sekretarino de la Haga grupo, **Koningin Emmakade, 97. Den Haag**, Nederland. Ili kostas unu ŝpessmilon po 35 ilustritaj kartoj.

## ESPERANTO FACILA

### La Duo por la Dua

— Kion la Verviers'a kongreso decidis, S-ro Agemulo, por organizi en nia lando ĝeneralan kaj efikan (1) propagandon por Esperanto?

— Ho! tio koncernas la specialan propagandan komision, kiu estis starigata (2) en Huy kaj la ligestaron (3), la parolantojn, ne min.

— Do, ĉu vi ne interesiĝas pri propagando?

— Male! Se unuflanke mi ne okupas min pri ĝenerala propagando, aliflanke mia amiko Filipo kaj mi, ni fidas nur en persona propagando, kaj ni juris fari tian.

— Vi mienas tiel kaŝeme (4)! Kion vi do intencas fari? Ĉu estas sekretaĵo?

— Tute ne! Aŭskultu! La vesperon de la 27a de Junio, en Verviers, alveninte ĉe la supraĵo de l'entuziasmo, ni ambaŭ prenis grandan decidon.

— Ĉu iri al kaj varbi por la Barcelona kongreso? Kaj al la Usona?

— Kara amiko, se ĉiu kuraĝa esperantisto havus sufiĉan monon kaj tempon, mi certigas vin ke internaciaj kongresoj ne estus plu eblaj, pro la trograndnombro de la partoprenantaj.

— Kion do vi decidis?

Nu, en tiu ĉi jaro mem, ĉiu el ni devos varbi minimume (5) ses anojn, aŭ...

— Aŭ, se ne...

— Se ne, edziĝi kun esperantistino en la venonta jaro.  
— Jen teruriga (6) puno por du glaciigintaj (7) fraŭloj kiel vi ambaŭ.

— Tamen, jen estas bona kaj eble feliĉiga rimedo por pligrandigi la Esperantistaron ! Kaj, kiu scias ? En niaj vicoj mi jam plezure vidas tiom multe da graciaj, dolĉaj vizaĝetoj...

— Sendube... mi jam rikomendas min kiel bona baptopatro (8).

— Ho ! atendu kaj atentu almenaŭ pri nia persona propagando.

— Kiamaniere vi intencas persone divastigi la internacian lingvon ?

— Ĉiamaniere. Al tiuj, kiuj dubas pri la ekzistebleco de nia lingvo, ni diros : ĝi jam vere kaj fortike (9) ekzistas, kaj mia amiko Filipino montros al ili la aron da poŝtkartoj kiujn li ricevis el ĉiu parto de la mondo. Kiu kontraŭdiros je tiu praktikeco ?

— Bone ! Sed estus kontraŭuloj, kiuj asertadas (10) ke, malgraŭ tiu skriba valoro, Esperanto estus parolata diversmaniere de alilandanoj.

— Ho ! ni starigos en nia urbo esperantan gasttablon, ĉirkaŭ kiu ni kunvenos kaj kunvenigos amikojn regule ĉiu-semajne por interparoli Esperante, kaj kie ni akceptos la fremdlandajn samideanojn, kiuj intencos viziti nian urbon. Tiamaniere, ĉiu kontraŭulo povos juĝi, ke ĉiulandaj esperantistoj malgraŭ eble iomete ia malsameco en l'elparolado, interkomprenas mirige.

— Bone, bone. Kaj plie ?

— Ni klopodu por ke en ĉiu urba kantfestoj kaj festeno, oni kantu ankaŭ en Esperanto. Tiel ni samtempe altiros la atenton de la publiko al la ekzisto kaj la bonsoneco de nia lingvo. Ni portos ĉiam la verdan stelon. Ni disdonos esperantajn broŝurojn.

— Kaj plie ?

— Plie ? Ŝajnas al mi ke tio sufiĉas por varbi kelkajn anojn al nia urba grupo. Se ĉiu ĉeestinto de la Verviers'a kongreso farus la saman, aŭ eĉ pli malgrandan, personan propagandon, la tiea esperplena krio de nia ligprezidanto estus superita (11) : « En Bruĝo ni estas pli ol 500 ope ! » — Eble 1000 ope !

— Mi deziras al vi kaj al via amiko grandan sukceson, Sinjor' Aĝemulo. Ĉu vi permesas ke mi konigu viajn ideojn pri persona propagando al la legantoj de la Belga Esperantisto », por ke ili agu sammaniere ?

— Certe, sed nomu nek min, nek Filipon.

— Estu trankvilaj ambaŭ ; mi baptonomos vin : la duo por la dua nacia kongreso. Pli malfrue, se vi edziĝos, mi eble devos diri : la kvaroj por la kvaroj...

— Edziĝi, tiu ideo ankoraŭ tremigas min. Sed... silentu, mi vidas konatulon, la faman aerveturigiston (12) Ĉielulo ; mi iros al li, mia propaganda laboro jam komencas. Adiaŭ !

— Ho ! kia fervoreco ! Mi vidas kun feliĉo ke nova blua ĉielo kun ridanta suno nun briladas super la belga esperantistaro. Tio ĝojigas mian koron de malnova fidelulo ! S-ro Aĝemulo, kuraĝe antaŭen ! Ĝis reveno !

SKALDO.

### Klarigoj

(1) Efikan, afdoende, *efficace* ; — (2) starigi, oprichten, *établir, organiser* ; — (3) estraro, bestuur, *direction* ; — (4) kaŝeme, geheimzinnig, *ayant l'air de vouloir cacher* ; — (5) minimume, minstens, *au moins* ; — (6) teruriga, bangmakend, *terrorisant* ; — (7) glaciiginta, bevrozen, *gelé* ; — (8) baptopatro, peter, *parrain* ; — (9) fortike, kloek, *robustement* ; — (10) aserti, beweren, *prétendre* ; — (11) superi, overtreffen, *excéder* ; — (12) aerveturigisto, luchtreiziger, *aéronaute*.

## Humoraĵoj

### Obstina vojaĝanto

#### Scenejo en Pariza omnibuso

Kondukisto al vojaĝanto, ekvidante infanon sidantan apud li:

— Vi ne prenas la infanon sur viajn genuojn ?

Vojaĝanto. — Mi ne prenas la infanon sur miajn genuojn.

Kondukisto. — Kiel vi volas ; sed se tiel, pagu tridek centimojn por ĝia sidloko.

